



# Brazila



# Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE  
**BRAZILA LIGO ESPERANTISTA**

Elirante ĉiumonate — Aparecendo mensalmen-  
te  
**REDAKCIO--AVENIDA RIO BRANCO 153, 2.<sup>o</sup>**  
RIO DE JANEIRO ————— BRAZILIO

B. L. E.

Honora Prezidanto—*Inĝ.<sup>o</sup> Everardo Backheuser*  
Prezidanto—*Inĝ.<sup>o</sup> Alberto Couto Fernandes*  
Vicprezidanto—*D-ro João Keating*  
1<sup>a</sup> Sekretario—*D-ro João B. Mello Souza*  
2<sup>a</sup> Sekretario—*Inĝ.<sup>o</sup> Hernani da Motta Mendes*  
Kasisto—*Edmundo Felix Tribouillet*

## ENHAVO

Brazila Ligo Esperantista.—IX Congresso Universal de Esperanto.—Nova triumfo por Esperanto.—Nekrologio.—Al Mallaboremulo.—Mar-meze!—Frazaro.—Enigma Fako.—Versetoj.—5<sup>a</sup> Brazila Kongreso de Esperanto.—5<sup>o</sup> Congresso Brasileiro de Esperanto.—Kroniko.—Korespondado.—Novaj gazetoj ricevitaj.—Bibliografio.—O Esperanto no estrangeiro.—Grupoj esperantistaj.—Cirkulero.—B. L. E.—Anoncoj.

**Rio de Janeiro - Brazilio**

## GRUPOJ ESPERANTISTAJ

B. L. H.

UNUIĜO KREAS FORTON

1906—Marto — «**Suda Stelaro**», Campinas—Stato São Paulo—Prez. Ing<sup>o</sup> Tobias R. Leite.

Junio—**Brazila Klubo «Esperanto»**.—Avenida Rio Branco, 153, 2<sup>o</sup> andar, Rio de Janeiro.—Prez. **Kolonelo** Dr. Moreira Guimarães.—1<sup>a</sup> Sek. H. Motta Mendes.

1907—Septembro—**Esperanta Klubo**—Aracajú—Stato Sergipe—Prez. D-ro Alcibíades Corrêa Paes — 1<sup>a</sup> Sek. Sebastião d'Albuquerque.

1909 Julio—**Norda Matena Stelo**.—Tamoyos n. 41 B. Belem, Stato Pará.—Prez. Anna Sarah de Mattos.

1910—Julio — **Grupo Esperantista de Juiz de Fóra**.—Juiz de Fóra — Stato Minas Geraes.—Prez. Paulino Bandeira.

Novembro—**Esperantia Grupo de Bahia**—Stato Bahia.—Prez. Kolonelo Deraldo Dias.

Dezembro—**Brazila Esperantista Klubo**.—Quitanda 47. — Rio de Janeiro — Prez. Giovanni Leoni—1<sup>a</sup> Sek. Rinaldo de Souza.

1911—Januaro.—**Societo Esperantista Doktoro Baena**.—Belem. Stato Pará—Prez. Dr. João Pedro de Figueiredo.

Aŭgusto—**Samideaninaro**.—Aracajú—Stato Sergipe.—Prez. F. Sylvia de Oliveira Ribeiro.—1<sup>a</sup> Sek. Norma Reis.

1912—Aŭgusto—**Virina Klubo**.—Stato General Severiano, 170—Rio de Janeiro. — Prez. S-ino Räckel Bessa Filha.

Ni publikigas nur la nomojn de l'grupoj kiuj aliĝis al **Brazila Ligo Esperantista** aŭ helpis **Brazilan Esperantiston**.

A **Brazila Ligo Esperantista** (Ligo Esperantista Brasileira) cuja directoria é annualmente eleita pelo Congresso tem por fim dirigir a propagação do Esperanto no Brazil em questões de interesse geral, proceder a exames de Esperanto, dar diplomas de professores, auxiliar os grupos e representar em qualquer emergência a opinião dos esperantistas brasileiros.

SÉDE—Rio de Janeiro.

**COTISAÇÃO ANNUAL.** Cada grupo que adherir paga 10\$000 por anno e elege um delegado, de preferencia residente no Rio de Janeiro. Póde o Grupo escolher mais de um delegado, pagando nessá hypothese 10\$ cada um.

Qualquer pessoa póde isoladamente adherir á Liga, pagando a annuidade de 5\$. Não ha jóia.

**VANTAGENS.** Os grupos que adherirem á Liga gozarão das seguintes vantagens

a) Recebem gratuitamente o «Brazila Esperantista» e para os socios com abatimento de 20 % do preço da assignatura annual ;

b) Por intermedio dos seus delegados são informados das decisões da Directoria da Liga na quaes tomam parte;

c) Gozam de abatimento nas edições da Liga e nas encomendas que por meio della fizerem de obras esperantistas ;

d) Recebem da Liga todo o auxilio que esta lhes puder prestar, em beneficio da propagação e diffusão do Esperanto ;

e) Podem publicar no orgão official da Liga informações mensaes sobre o movimento esperantista local.

**NOTA.**—A Liga não intervem em assumptos referentes á vida interna dos grupos filiados, podendo estes agir livremente de accordo com os fins para que foram creados.

Das vantagens c, d e e gozam tambem as pessoas que adherirem isoladamente á Liga, as quaes recebem o «Brazila Esperantista».

As pessoas que desejarem adherir á Liga devem dirigir-se ao Sr. E. FELIX TRIBOUILLET, thesoureiro. Avenida Rio Branco 153, 2<sup>o</sup> andar. O remettente receberá o cartão de membro da Liga.

Quanto á adhesão dos grupos e demais informações, dirigir-se ao Sr. J. B. MALLOE SOUZA, 1<sup>o</sup> Secretario.

# BRAZILA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGAÑO

de "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA"

5-a Jaro

Julio-Agusto—1913

Numero 3-4

JARABONO	Elirante ĉiumonate—Apparecendo mensalmente	Specimeno 0, fr. 50 (0. Sm. 20)
En Brazilio 3\$000	REDAKCIO — AVENIDA RIO BRANCO, 153 2.º ANDAR	Num. avulso 300 réis
Eksterlande 5 fr. (2 Sm.)	RIO DE JANEIRO — BRAZILIO	Helpabono 10\$000

## Brazila Ligo Esperantista

Adheriu á «Brazila Ligo Esperantista» o Dr. Haroldo Amaral, de S. Paulo, que nos remetteu a quantia de 30\$000 (20 Sm.). Recebemos tambem do Dr. Antonio Carlos de Aruda Beltrão, (ex-presidente do *Alagoas Esperanta Klubo*), 300 exemplares da sua Conferencia e do Dr. José Arthur Boiteux mais de 100 clichés de vistas do Rio de Janeiro, dos quaes alguns já foram publicados no numero anterior desta Revista.

Agradecidos.

Pedimos insistentemente aos esperantistas isolados e aos Srs. secretarios dos grupos, que nos enviem sempre noticias sobre o movimento e propaganda nas suas cidades para que as possamos publicar na nossa *Kroniko*.

## IX Congresso Universal de Esperanto

Dentro de alguns dias a reunião do IX Congresso Universal de Esperanto ser' uma pujante e grandiosa realidade.

A formosa capital da Suissa prepara-se para receber festivamente as centenas de esperantistas que, de todos os paizes do mundo, vão contribuir com sua presença e seus esforços para o exito da grande assembléa do corrente anno.

A commissão organizadora do congresso, secundada por valorosos e dedicados auxiliares, acha-se entregue a um trabalho febricitante, promovendo os ultimos preparativos para que as grandes festas e solemnidades se revistam do maximo brilhantismo.

Todas as providencias foram tomadas para que os esperantistas encontrem na bella cidade helvetica

um acolhimento fidalgo e hospitaleiro. É o número de adhesões já recebidas garante uma concurrencia extraordinaria principalmente porque inumeros samideanos só nos ultimos dias manifestam a intenção de ir.

O programma do congresso consta de solemnidades de inauguração e encerramento, festas diversas, officios religiosos, excursões aos pontos mais pittorescos da região, conferencias, jogos sportivos e do tradicional baile internacional, que é um dos maiores attrativos das grandes assembléas esperantistas.

Será uma brilhante serie de festas cujo encanto ainda maior se torna pelo facto de se acharem reunidos, em numero consideravel, os batalhadores incunsaveis do esperantismo em todo o mundo. Essa circumstancia é que dá um aspecto inteiramente inedito e inconfundivel ás reuniões effectuadas "sub la verda standardo"

Além das secções ordinarias do congresso haverá muitas reuniões especiaes de estudantes, medicos, operarios, professores, viajantes, commerciantes, livre-pensadores, enxadristas, philatelistas, e outras que provavelmente serão organizadas mesmo durante o congresso.

Reunir-se-á tambem, pela 3ª vez, em assembléa geral, a «Universala Esperanto Asocio.»

Antes do Congresso Universal, realisar-se-á uma serie de festas em Gent, na Belgica, onde serão distribuidos os premios do concurso litterario.

Findo o Congresso, os esperantistas, divididos em caravanas, effectuarão varias excursões a Interlaken, Lucerna, Riga, Esperanta Paradizo, Zurich e outras localidades formosas pelas bellezas naturaes que possuem.

Aguardemos, pois, confiantes, as noticias que brevemente receberemos, certos de que ellas hão de relatar mais um memoravel triumpho para o Esperanto.

J. B. M. S.

## Nova triumfo por Esperanto

*La teozofoj alprenas oficiale Esperanton.*

En Stockholm okazis la 15—21-an de junio internacia teozofa kongreso. La kongreso ankaŭ interalie pitraktis la demandon pri internacia helpa lingvo por la teozofa mondmovado. La propono de nia samideano, juĝisto kaj tribunala prezidanto, s-ro Deziderio de Szentmáriay el Budapest, ke Esperanto estu la lingvo in'ernacia de la teozofoj kaj estu akceptata kiel la kvara oficiala lingvo de la teozofaj kongresoj, estis unue remetita al la labora komitato de la kongreso. Post pritrakto kaj aprobo de la komitato kaj direkto la propono estis prezentata al la kongreso de la ĝenerala sekretario Robert Nadlev. La propono estis *unuanime akceptata de la kongreso*. Laŭ tiu decido Esperanto jam estos uzata kiel *oficiala lingvo* en la venonta, en Parizo okazonta internacia kongreso. Nova grava sukceso por Esperanto!

*Mefistofeles.*

(El «La Espero»)

## Nekrologio

**ARNO HOWARD**

Jus venis al ni malĝojiga, neatendita sciigo —mortis Arno Howard, nia bonkora, sindonema samideano, kiu laboradis ĉe la federacia komitato protektanta la sovaĝulojn.

Arno Howard naskiĝis en Melitopoli, Suda Rusujo. Antaŭ kelkaj jaroj li alvenis Rion kune kun J. Michulovitch, setlante en nia patrolando la oficon en kiu li deziris uzadi sian agemon de junulo kuraĝa kaj laborema.

Dank'al siaj bonaj ecoj li tuj alogis estimon de ĉiuj kiuj lin konis. Kun bedaŭro ni vidis ke estis por li necese foriti, kaj suferi la malfacilan vivadon de tiuj, kiuj nun kunportas la civilizacion en la plej densajn arbaregojn de Matto Grosso.

Kvankam malproksime, Arno Howard neniam forgesis Esperanton kaj siajn samideanojn kaj ofte la telegrafo alportis la korajn salutojn kiujn li sendis al ni, okaze de niaj kunvenoj kaj festoj.

La direktoro de l'komitato al kiu li apartenis sciigis, ke granda estis la malĝojo de liaj kunuloj pro la perdo de amiko tiel afabla, tiel laborema, tiel bona kiel estis Arno Howard.

Ankaŭ ĉe ni, esperantistoj, sinceran malĝojon kaŭzis la malapero de tiu sindonema kaj malnova amiko kiu bedaŭrinde trovis la morton kiam li, tiel malproksime de siaj karuloj, kunlaboris por la progreso de nia patrolando. Al lia familio niajn kondolencojn!

## AL MALLABOREMULO

(De Stahl)

Kion vi opinias pri muelisto, kiu senĉese lasus turniĝi kontraŭ la vento la flugiloj de lia muelilo, neniam donante al ĝi ion por mueli?

Vi dirus al vi mem:

—Jen estas stulta muelisto. Li prave bone disrompigus sian muelilon, anstataŭ ol ĝin kondamni aŭdi vivdaŭre sian neutilan regulan frapadon—tik, tak.


Ho! mallaboremulo, amiko mia, nenion donante al via animo por mueli, vi estas tiu stulta muelisto.

Via koro estas la muelilo, kiu vane eluziĝas. Ĝiaj batoj, dank'al via mallaboremo, estas nur la senproduktaj frapadoj de maŝino sen direkto.

El la franca lingvo tradukis.

*Kotinju.*

Araxá, majo 1913.



## MARMEZE!

(Al Donjo)

*Cielo kaj maro! De tero nek ombro!*  
Ondegoj petolaj sinsekve la ŝipon  
Ameme postvenas, proksimen alvenas,  
Envolvas karese, momente haltiĝas,  
Kaj tuj malaperas en sonĝo rapida.

Sur ĉiu ondeto

Vizaĝon la vian

Mi vidas kontente,

Samtempe malĝoje.

Cielo la blua surtegas la maron,  
Se granda ombrelo ĝi estus,  
Kaj suno brilega trapasas, venkanta,  
Heligas la maron, vivigas la mondon.  
Kaj ĉio, la ondoj, ĉielo, la suno,  
Prezentas verege imagon karegan,

La vian.

Saŭdado! Malĝoja vorteto, kaj tamen  
Amema!

*La Forgesito.*

# FRAZARO

A—Sro. B. permesu, ke mi prezentu al vi Sron C.

B— Mi tre ĝojas konatiĝi kun vi.

C— Same al vi. Mi jam konas vin laŭ nomo.

B— Cu de longe vi estas esperantisto?

C— De tre longe, ne. Nur de tri monatoj.

B— Mi gratulas vin. Vi jam parolas tre bone.

C— Vi estas tre ĝentila. Mi ne havas praktikon, kaj pro tio mi sentas min ĝenata, kiam mi estas devigata paroli Esperanton.

B— Sen praktiko vi ne sukcesos paroli flue.

— Sr. B., permissa que lhe apresente o Sr. C.

— Folgo-muito em travar conhecimento com o Senhor.

— Da mesma forma. Já o conheço de nome.

— Ha muito que é esperantista?

— Ha muito, não. Apenas ha tres mezes.

— Faço-lhe meus cumprimentos. Já falla muito bem.

— E' muito amavel. Não tenho pratica, e por isso sinto-me acanhado quando sou obrigado a falar Esperanto.

— Sem pratica não conseguirá falar fluentemente.

N. B.

## VERSETOJ

Sian nomon oni skribas  
Per literoj simpatiaj ;  
Kiam vidas mi l'unuan,  
Mi tuj pensas pri l'aliaj.

Ofte ni tre gaje ridas  
Kun malĝojo en la kor';  
Car neniu ĝin travidas,  
Ne aperas la dolor'.

Mi ĝin volis, ŝi ĝin volis.  
Petis mi, ŝi malkonsentis ;  
Mi revenis, ŝi forkuris;  
Mi forkuris, ŝi tuj pentis.

Vent' agitas la palmarbon,  
Kaj ĝi staras necedante;  
Mia kor' ankaŭ suferas,  
Sed daŭrigas ja konstante.

Mi vivadas en dometo  
Malfermita ĉiam, ja ;  
Apud ĝiaj fenestretoj,  
Dolĉe kantas sabia'.

Tie kantas mi belaĵojn,  
De la kampo kaj de l'monto;  
La kolorojn de l'montaro  
Kaj la bruojn de la fonto.

Esperantigis

J. B. Mello e Souza.

## Enigma Fako

### MONATA KONKURSO

AŬGUSTO

ENIGMO 3

e	e	s	s	s
	e		s	s
e	e	s	s	s

ENIGMO 4

Papapa kkkkk'k

SARADO 9

En tiu monato la batrako manĝas herbon. 2 — 2.

SARADO 10

Kia ĝoja korpaparto kiel medikamento !  
2 — 2.

SARADO 11

La viro uzas rajdsidejon kiel spicaĵon.  
2 — 2.

Kotinju.

Jen estas la solvoj de la ŝaradoj de l'maja numero: *Barometro*, *Marioneto*, *Napoleono*, *Aerolito*, *Kalomelo*.

Divenis: *Kotinju*, *Armo kaj Gertrudes da Silva* (5), *Komencanto kaj Iaso* (4).

*Ĉiudumonte ni donas lote du premiojn al la divenintoj de niĝaj enigmoj. La solvoj de la supraj enigmoj aperos en la oktobra numero.*

Iu,

## 5. BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

RIO DE JANEIRO — DE LA 11<sup>a</sup> ĜIS LA 15<sup>a</sup> DE DECEMBRO

### 1<sup>a</sup> Cirkulero

«En laboro paca ne laciĝu.» Tiel diras nia Majstro en la famkonata himno; kaj, kompreneble, ni ne povas, ni ne devas laciĝi kaj perdi, pro manko de propagando, sepjaran laboradon.

Efektive se nun ni haltos paroli pri Esperanto laŭte kaj vigle, ni mortos, kaj mortos la semo de Esperanto tiel malfacile dissemita de niaj antaŭuloj tra nia lando. Sed, se ni neniam haltos, ni venkos.

Ni ne haltu!

Laŭ ni tre bone konstatis, la periodaj kunvenoj de esperantistoj multe prosperigas la disvastigon de Esperanto, ĉar antaŭ kaj dum la kongresoj la publiko atentigas pri niaj kongresoj kaj ĉiam oni rikoltas novajn fervorajn kunbatalantojn.

La devo de ĉiu sincera esperantisto estas helpi la naciajn kongresojn, ĉu farante ĝian propagandon en siaj rondoj, ĉu petante al la loka gazetaro noticojn kaj artikolojn, ĉu ĝin subtenante per mono, unuvorte, ĉiamaniere.

La 5<sup>a</sup> Brazila Kongreso, laŭ decido de la 4<sup>a</sup>, okazos en Rio de Janeiro. En tiu sama urbo jam okazis la unua, antaŭ 6 jaroj. Kiam oni rigardas la vojon trairitan de tiu tempo ĝis nun, oni konstatas valorajn paŝojn, kaj neniu devas forgesi ke tiujn paŝojn ni suldas nedubeble al tiu Unua Kongreso, prezidita persone de S-ro Tavares de Lyra, tiama Ministro de Internaj Aferoj de la Respubliko. Poste la esperantista amikaro kunvenis en S. Paulo (1909), en Petropolis (1910), kaj fine en la ĉarma Juiz de Fóra (1911).

La venonta renkonto de la nacia esperantistaro en nia granda ĉefurbo, sidejo de la centraj institucioj de la brazila propagando, estos en Decembro, dum la semajno de la datreveno de D-ro Zamenhof.

Ĉi-tie la esperantistoj de ĉiuj Ŝtatoj vidos ne nur niajn esperantistajn bibliotekojn kaj niajn kursojn teoriajn kaj praktikajn, sed ankaŭ la vidindaĵojn de nia gastema urbo.

Venu, amikoj!

Se vi estas *malnova esperantisto*, venu, ĉar vi manprenos viajn konatulojn, viajn korespondantojn, viajn amikojn, ĉar ili ankaŭ venos.

Se vi estas *nova adepto* de Esperanto, venu nepre, ĉar vi interrilatiĝos kun la lastaj pioniroj de nia movado pri kiuj vi aŭdis kaj certe deziras koni, ĉar ili ĉiuj neniam forgesas veni al niaj kongresoj. Venu ĉiuj, novaj kaj malnovaj, junaj aŭ maljunaj, komencantoj aŭ delonge batalantoj. Venu, samideanoj!

Se nia *kvina* plensukcesos, estos definitiva venko de nia Ideo; se al ĝi ne alkuros granda nombro da esperantistoj, la skeptikuloj diros ke Esperanto valoras nenion. Via veno estas do necesa, ĉar se ĉiu diras «la manko de unu ne malhelpos ĝin», fine neniu venos.

La 5<sup>a</sup> Kongreso okazos en Rio de Janeiro de la 11<sup>a</sup> ĝis la 15<sup>a</sup> de Decembro.

La organiza komitato klopodos aranĝi rabaton en la biletoj por la samideanoj, kiuj petos tiun favoron kun sufĉe da tempo antaŭa.

En Rio oni povos loĝi tre malkare en modesta hotelo aŭ pensio. Ni donos precizajn informojn al la petontoj.

Dum la kongreso okazos muzikaj koncertoj, teatraĵoj, paroladoj kun lumbildoj, kinematografo, promenadoj al la plej vidindaj punktoj de la ĉerkaŭaĵoj, piknikoj, baloj, k. t. p., k. t. p., laŭ programo zorge organizota kaj disdonota al ĉiuj kongresanoj antaŭ la kvina.

Kotizaĵo por la kongreso, kun rajto ĉeesti ĉiujn kunvenojn kaj festojn.....	10\$000
Persono de la familio de l'kongresano, havante la samajn rajtojn.....	5\$000

Tuj post la ricevo de la kotizaĵo, la kongresano ricevos belpresitan kongreskarton.

Oni adresu ĉiujn korespondadojn al — *Kvina Brazila Kongreso de Esperanto*, Av. Rio Branco, 153, 2<sup>o</sup>—Rio de Janeiro.

LA ORGANIZA KOMITATO

# 5º CONGRESSO BRAZILEIRO DE ESPERANTO

RIO DE JANEIRO — DE 11 A 15 DE DEZEMBRO

## 1ª CIRCULÁR

«En laboro paca ne laciĝu.» «Não vos causeis no trabalho pela paz.» Assim diz o nosso Mestre no famoso hymno; e, naturalmente, nós não podemos nem devemos nos cansar e, por falta de propaganda, perder sete annos de trabalho.

Effectivamente, si agora deixarmos de fallar sobre o Esperanto, alta e vigorosamente, desapareceremos e morrerá tambem a semente do Esperanto, com tanta difficuldade disseminada pelos nossos predecessores atravez a nossa terra. Mas, si não pararmos, venceremos.

Não paremos!

Como temos sempre observado, as reuniões periodicas de esperantistas muito concorrem para propagar o desenvolvimento do Esperanto, porque, antes e durante os Congressos, o publico observa os nossos progressos e sempre se obtêm novos e fervorosos batalhadores. E' dever de todo o sincero esperantista auxiliar os Congressos nacionaes, já fazendo a sua propaganda nos seus circulos, já pedindo á imprensa local a inserção de noticias e de artigos, já subvencionando-os pecuniariamente; em uma palavra: de toda a forma.

O 5º Congresso Brasileiro, na conformidade da resolução do 4º, reunir-se-ha no Rio de Janeiro. Nesta mesma cidade já se reuniu o primeiro, ha seis annos.

Quando se olha o caminho percorrido desde aquella época até agora, constata-se valorosos passos e ninguem deve esquecer que esse exito nós attribuímos sem duvida ao primeiro Congresso, presidido pessoalmente pelo Dr. Tavares de Lyra, então Ministro dos Negocios Interiores da Republica. Depois, os amigos do Esperanto reuniram-se em S. Paulo (1909), em Petropolis (1910) e, finalmente, em Juiz de Fóra (1911). A futura reunião dos esperantistas nacionaes na nossa grande capital, séde das instituições centraes da propaganda esperantista no Brazil, será em Dezembro, durante a semana da data natalicia do Dr. Zamenhof.

Aqui, os esperantistas de todos os Estados verão, além das nossas bibliothecas esperantistas e dos nossos cursos theoreticos e praticos, as bellezas da nossa hospitaleira cidade.

Vinde, amigos!

Si sois *velho esperantista*, vinde, porque apertareis a mão aos vossos conhecidos, aos vossos correspondentes, aos vossos amigos, pois que elles tambem virão. Si sois *novo adepto* do Esperanto, vinde sem falta, porque vos relacionareis com os antigos pioneiros do nosso movimento, a respeito de quem vós tendes ouvido fallar e certamente desejaes conhecer, pois que elles nunca se esquecem de vir aos nossos Congressos. Vinde todos, novos e antigos, moços ou velhos, principiantes ou batalhadores de longa data. Vinde, samideanos!

Si o nosso *Quinto* fôr coroado de successo, será a definitiva victoria da nossa Idéa; si a elle não acudir avultado numero de esperantistas, os scepticos dirão que o Esperanto nada vale.

E', por conseguinte, necessaria a vossa vinda, porque si cada um disser «a falta de um não prejudica», afinal ninguem virá.

O 5º Congresso reunir-se-ha no Rio de Janeiro de 1 a 15 de Dezembro. A Comissão Organizadora esforçar-se-ha por obter redução nos bilhetes de passagem para os «samideanos» que solicitarem esse favor, com sufficiente antecipação.

No Rio poder-se-ha alojar barato, em modesto hotel ou pensão. Daremos precisas informações aos que as pedirem. Durante o Congresso realizar-se-hão concertos musicaes, espectaculos, conferencias com projecções luminosas, cinematographos, passeios aos pontos mais lindos dos arredores, pic-nics, bailes, etc., etc., conforme o programma cuidadosamente organizado e distribuido em tempo a todos os congressistas.

Contribuição para o Congresso, com direito a assistir a todas as reuniões e festas.	10\$000
Por pessoa da familia do congressista, tendo os mesmos direitos.....	5\$000

Logo após á recepção da contribuição, o congressista receberá o Cartão de Congressista, bellamente impresso.

Dirigir a correspondencia para — 5 Congresso Brasileiro de Esperanto, Av. Rio Branco, 153, 2º andar—Rio de Janeiro.

# KRONIKO

**Bahia.** — En la urbo Nazareth «O Conservador», kies redaktoro nun lernadas esperanton, publikigis bonan artikolon de propagando.

**Ŝtato Rio.** — La 6-an de Aŭgusto, ĉe «Federação Espirita de Nictheroy», S-ro Severino de Freitas malfermis kurson de Esperanto, kiu fuukcios ĉiumerkrede, de la 7<sup>a</sup> ĝis la 8<sup>a</sup> nokte.

**Rio de Janeiro.** — La estraro de Brazila Ligo Esperantista elektis la daton por la proksima *Kvina Brazila Kongreso de Esperanto*, kiu okazos de la 11-a ĝis la 15-a de Decembro 1913 en Rio de Janeiro. La organiza komitato konsistas el s-roj: prez. sub-kolonelo s-ro J. M. Moreira Guimarães; vicprez. d-ro José Arthur Boiteux; unua sek. d-ro J. B. Mello e Souza; dua sek. José Machado Tosta; kas. E. Felix Tribouillet. Alie ni publikigas la unuan cikuleron pri tiu Kongreso.

Brazila Ligo Esperantista sendis al ĉiuj ĵurnaloj en Brazilio numerojn de Brazila Esperantisto, ekzempleron de l' propaganda parolado de d-ro Arruda Beltrão, propagandajn kovrilojn kaj ŝlosilojn. Jam ni ricevis kelkajn el tiuj ĵurnaloj parolintaj pri la senditaj propagandiloj.

— La 6-an de Julio okazis la 9-a kunveno de *Virina Klubo* ĉe s-ino Corina Soler. Oni ludis fortpianon, kantis, deklamis, dancis, k. c. En la koncerto partoprenis la jenaj personoj: f-inoj Carmen Faria Rocha, Avani S. do Couto, Yonne S. do Couto, Adelaide Moraes, Vanda S. do Couto, Julia Fernandes, Chiquinha Amaral, Hilda Amaral, Joaquina Amaral, s-ino Dioguina C. Corrêa, s-roj Arlindo Esteves kaj Hygino Esteves

— Je la 10-a de Julio komenciĝis praktika kurso direktata de d-ro Nuno Baena, ĉe sidejo de Brazila Klubo «Esperanto». La kurso funkciadas lunde kaj merkrede de la 4-a ĝis la 5-a vespere.

— Je la 2-a de Aŭgusto, ĉe sidejo de Societo de Geografio, kunvenis *Virina Klubo* por balotado de sia nova estraro. Post malfermo de l' kunsido, la unua sekretariino, f-ino Julia Fernandes, raportis pri la faritaj laboroj. Laŭ ŝia propono estis poste aklamita la jena nova estraro: prez. s-ino Rachel Bessa Filha; vicprez. f-ino Avany Baggi de Araujo; unua sek. S-ino Gertrudes da Silva; dua sek. f-ino Romancina Calmon; kas. s-ino Orizaba Guimarães. Paroladis salutante la klubon f-ino Francisca Amaral Santos, s-roj d-roj Venancio

da Silva, je nomo de Brazila Klubo Esperanto, kaj J. B. Mello e Souza, je nomo de Brazila Ligo.

— La konata ĵurnalo «O Paiz» publikigis artikolojn de s-ro Jacques Patin por la franca lingvo kaj kontraŭ Esperanto, sed tiu sama ĵurnalo, post kelkaj tagoj, transkribis belan artikolon de s-ro Léo Claretie el «Paris-Esperanto» kaj ankaŭ leteron de d-ro Nuno Baena pri la supereco de Esperanto kiel helpa lingvo.

— «O Imparcial», kiu daŭrigas ĉiulunde propagandi Esperanton per siaj kolonoj, aperigante konstantan esperantan fakon publikigis je la 21-a de Julio la portretojn de nia majstro L. Zamenhof, d-ro E. Backheuser kaj d-ro Couto Fernandes, kun bonega artikolo.

— Ankaŭ «A Noite», en tiu sama tago aperigis belan kolonon pri tiu.

— Antaŭ kelkaj tagoj alvenis al Rio boHEMA esperantisto s-ro Antono Polivka, vigla propagandisto, kiu de nun restos inter ni. Pere de B. K. E. li tuj sukcesis ricevi oficlokon ĉe bindisto en nia urbo.

— Samtempe alvenis ankaŭ el Argentino alia samideano, s-ro Leon Sabah, profesoro de lingvoj. Li intencas loĝi en nia urbo, instruante la francan lingvon kaj Esperanton ĉe la lernantoj.

— «Gazeta Suburbana», kun konstanta esperanta fako, publikigis portreton de d-ro Couto Fernandes. Ankaŭ ĝi sciigas ke s-ro José Moraes da Cunha Vasconcellos, bienhavanto en Campanha, apud Realengo, antaŭurbo de Rio, apartigis je partoj unu el siaj bienoj kaj al la strato el tio aperinta, li donis la nomon «Strato Esperanto». En tiu strato jam aĉetis terpecon nia samideano s-ro Alekso Fanzéres.

— La kuracistaj revuoj *Semana Medica*, *O Brazil Medico* kaj *Annaes de Medicina Militar* transkribis portugale la cikuleron de s-ro Briquet pri Esperanto kaj la kuracistoj.

— La 26-an de Junio s-ro Annibal de Souza faris paroladon pri «Filologio kaj Esperanto», ĉe sidejo de Kristana Asocio de Junuloj. Li estis prezentita al la ĉeestantaro de s-ro Giovanni Leoni, prezidanto de Brazila Esperantista Klubo.

— La kurso de Esperanto ĉe Kristana Asocio de Junuloj estas nun direktata de nia kompetenta samideano s-ro Alekso Fanzeres, konata propagandisto.

— Ricevis la *ateston pri lernado*, post ekzameno, s-oj Mario Madeira dos Santos, Americo Ribeiro de Araujo, Heitor de Toledo, Octavio A. de Azevedo Macedo kaj f-ino Romancina Calmon.



— La revuo "Leitura para Todos" faris al siaj legantoj la jenan demandon: "kiu estos la universala lingvo, la estonta lingvo, kial?"

La premion gajnis fino Barbara Neves, kiu defendis Esperanton.

**S. Paulo.** — La revuoj «O Clarim» kaj «Verdade e Luz» publikigis bonajn artikolojn pri Esperanto kaj nia movado.

**Rio Grande do Sul.** — «A Eternidade» (Porto-Alegre), paroladis pri la progresoj de Esperanto kaj ĝia venko, kaj «Diario Popular» (Pelotas) aperigis poresperantan rakonton de S-ro J. P. Franz.

M. M.

## PORTUGALUJO

Oni esperas baldaŭan fondiĝon de grupo en *Caldas da Rainha*, kie laboradas s-ro J. Pires Machado.

— En *Porto* efektiviĝis je la 18 a de Majo la propaganda ekspozicio de Palacio de Cristal, kie oni vidadis 6000 poŝtkartojn esperantajn tie montritajn de niaj samideanoj. — Novaj kursoj malfermiĝis ĉe la Grupo, ĉe Kristana Unuiĝo kaj ĉe «Colegio dos Orfãos». Tiu ĉi lasta estas oficiala de la urbo kaj la kurso estas *deviga*; pri ĝi la urbestro sendis leteron al la prezidanto de l'Grupo Esperantista, dankante kaj laŭlante la helpon de la profesoroj de Esperanto por la instruado de l' lernantoj.

— En *Coimbra* belan esperantan ekspozicion aranĝis s-ro Eugenio Elyseu.

— En *Lisbono* okaze de l'fermo de kurso ĉe Kristana Unuiĝo, s-ro Bemaldo faris belan paroladon pri Esperanto, montrante ĝian sukceson al ldo. — Nova kurso tie malfermiĝis.

(El «Portugala Revuo»)

## Korespondado

DOCTEUR N. F. BOTTE, Casteau, Belgique, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

Kiu deziras ricevi senpage 6 belegajn ilustritajn poŝtkartojn de Brazilio, sendu du respondkuponojn al S-ro C. VELLOZO, Avenida Rio Branco 153, 2.<sup>a</sup>, sidejo de Brazila Klubo «Esperanto».

Li petas ĉiujn esperantajn gazetojn transkribi tiun ĉi noteton.

## NOVAJ GAZETOJ RICEVITAJ

**Informa Bulteno.** Organo de la Esperanta Fakto starigita en la Ĝenerala Korespondanta Klubo. Aperas laŭ bezone. Redaktas *Béla David*, universitata oficisto, Fakprezidanto, Egyetum, Kolozsvár (Hungrie.)

**La Espero.** Organo de la esperantistoj en Svedujo. Redakcio kaj Administracio: 3—23, Gefle — Svedujo. Jarabono: 1 Sm.

**Milana Esperantisto.** Oficiala monata organo de la *Milana Esperantista Rondo*. Redakcio kaj Administracio: Via Alessand. Tadino, 26 A. Milano. Italujo. Jarabono. 0,400 Sm.

**Progreso.** Sciigoj de la Revelo. (Rejna — Westfala — Ligo). Dumonata gazeto. Oficejo: Esperanta Societo Hagen i. W. Germanujo.

## BIBLIOGRAFIO

Ni ricevis kaj tre dankas:

**Internacia Ekspozicio pri Maraferoj, Mara Higieno kaj Itala Elmontro Kolonia.** — Sportaj-gimnastikaj festoj. Sciencaj kongresoj. Genova. Marto—Novembro 1914. Broŝuro kiu enhavas la resumon de la «Ekspozicia Programo».

**Gvidlibro kaj gvidfolio tra Breslau.** — Tiu ĉi presariĝinta ni ricevis kune kun prospekteto pri la nun okazanta en Breslau ekspozicio.

La kostoj de ĉiuj presariĝintaj estas pagitaj de la urbkomunumo, kiu faris «Esperantia Entrepreno». En la ekspozicio ĉeestis esperantisto je la dispono de la alvenontaj gastoj.

**Vojaĝado en Finnlando.** — Eldonita de Esperanto—Asocio de Finnlando. Bele ilustrata broŝuro pri Finnlando, kiu estas nomata «La paca angulo de Eŭropo».

**Lernolibroj de Esperanto por Rusoj** publikigitaj ĝis 1913 jaro, t. e. dum la 25 unuaj jaroj de uzado de la lingvo Esperanto (1887-1912). Eldonis «Esperanta Biblioteko de Georg Davidov en Saratov»—Rusujo. Librejo «Esperanto». Lubjanskij projezd 3. Moskvo. Rusujo. Prezo: 15 kop.

**Poeziaoj.** — de *Frederiko Schiller*. Tradukitaj de kolonelo Zevach. Nr. 1 el Nova biblioteko *Esperanto*. Eldonata de: J. Glück kaj D-ro Sós. Bauernmarkt nr. 15. Wien, 1. Aŭstrio. Prezo 1,50 kr.

**Curso Elementar de Esperanto semestremestre** em 10 lições de J. A. Proença. Composto e impresso na livraria e typographia de Francisco Joaquim de Almeida. Rua das Carmelitas, 106. Porto. Portugal. Preço: 2\$000 (fracos).

## O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

**Inglaterra.** — Os importantes jornaes de *Cambridge Weekly News* e *Cambridge Daily News* abriram uma secção semanal para a propaganda do Esperanto. — Foi coroado de grande exito o 6º Congresso Inglez de Esperanto, realisado de 10 a 13 de Maio ultimo, em Eastbourne.

**Suecia** — Realisou-se em *Stockholm*, de 15 a 21 de Junho ultimo, o Congresso Internacional de Theosophia. Por proposta do Sr. Deziderio de Szentmariay, presidente do tribunal de Budapest, foi o Esperanto aceito como uma das linguas officiaes do futuro congresso a realisar-se em Paris. O club «Verda Stelo» realisou grandes festas durante o congresso acima referido. — Fundou-se um novo club em *Kirima*.

**França.** — Teve lugar em 17 de Abril ultimo, a eleição da nova directoria da «Sociedade Francesa para a Propagação do Esperanto». Foi reeito presidente M. Rollet de l'Isle.

**Allemanha.** — No dia 1º de Junho realisou-se em Zschopau, com um extraordinario successo, a reunião annual da Sakska Ligo Esperanto. Nella tomaram parte mais de 350 esperantistas, entre os quaes notavam-se alguns vindos da Dinamarca, Austria e Jamaica. — A camara de agricultura do Grão Ducado de Oldemburgo apresentou na Exposição Internacional de Leipzig um grande album de casas de campo, cujo texto era escripto em allemão e Esperanto.

**Austria.** — A Associação Bohemia Socialista Monista, que já conta mais de 5.000 associados, aceitou por unanimidade, em sua reunião de 2 de Março, o Esperanto como lingua universal para suas relações internacionaes e recommendou seu uso aos monistas de todo o mundo. — Dois novos campos de petrolio da aldeia Sliwki, da Galisa, receberam os nomes de «Zamenhof» e «Esperanto».

**China.** — Continúa o Esperanto a fazer rapidos progressos atravez a vasta Republica Chinezã. A camara de deputados da Provincia de Oni aceitou a proposta de um dos deputados tornando obrigatorio o ensino do Esperanto em uma das escolas da referida provincia. — Abriu-se um curso na redacção do «Hina Socialista», em Shanghai. — As gazetas *Min Li-Pao*, *Min Chan-Pao*, *Sen Pao* e *Dan Konf-Pao* abriram uma secção de propaganda do Esperanto.

**Persia.** — A gazeta *Kavadag* de *Tabriz* publica constantemente artigos e informações sobre o movimento esperantista e tambem contos traduzidos do Esperanto. O cinematographo «Apollo» tem exibido fitas sobre os congressos esperantistas. Exis-tem actualmente esperantistas nas seguintes cidades;

Tabriz, Teheram, Recht, Gulfa, Urmia, Meshediser, Kochan, Ardebil e Lovuchbulag.

**Estados Unidos.** — O distincto esperantista E. Privat percorreu em Abril algumas cidades dos E. Unidos. Em *Washington* elle visitou o Presidente da Republica e o Ministro do Exterior, que se mostraram muito favoraveis ao Esperanto. A sua passagem por *Boston*, onde se realisaram festas e excursões em sua honra, teve como resultado immediato a criação de mais dois cursos de Esperanto. — A «Academy of Science and art» de Pittsburgh que é filial da Instituto *Cornegio* dos E. Unidos, creou uma secção esperantista. A importante «The American Esperantist Company» transferio sua séde para West Newton, Mass. — No importante «Christian Brothers College», de Saint Louis, Missouri, funcionam dois cursos de Esperanto.

**Perú.** — Entrou no seu 10º anno de existencia a revista «Antauen Esperantistoj!», fundada em 28 de Julho de 1913. E' a mais antiga revista esperantista depois da «Lingvo Internacia», Agradecendo as saudações especiaes que nos foram dirigidas desejamos ao decano da imprensa esperantista na America os maiores successos.

A. C. F.

## CIRKULERO

### ESTIMATA SAMIDEANARO

Ni intencas ree eldonadi *Tutmondan Adresaron Esperantistan* kaj senpage dissendadi ĝin al ĉiuj enskribiĝontoj. Ni enskribos plenan nomon de esperantisto, lian aĝon, profesion kaj adreson. Estas dezirindaj, sed nedevigaj, ankaŭ respondoj je la demandoj: kiam Vi esperantistiĝis kaj ĉu Vi apartenas al la esperantista grupo, societo aŭ klubo. Se iu interŝanĝas ion, notu ĉi-tion. La sciigojn sendu al ni en fermita letero, aldonante la internacian respondkuponon aŭ 10-kopekan rusan poŝtmarkon. Por tiu respondkuponon ni enpresos Vian nomon kaj transsendos al Vi tuj post apero volumeton, enhavantan Vian adreson. Ĉiu volumeto enhavos po 1000 adresoj.

Samideaninoj & Samideanoj! Pripensu la gravecon de la tutmonda enketo kaj tuj sendu al ni la necesajn informojn.

Altestime

C. Polak, delegito de U. E. A.

G. Favorskij, sekretario de Kiev, Esper. Societo.

Sendajojn oni adresu al George Javorkij, Annenkovskaja 28 Kiev (Rusl.)

# Sensacio en esp. literaturo!

## «EL PARNASO DE POPOLOJ»

Jubilea libro de esperantaj poezio kaj de ĝia Majstro, s-ro Antoni Grabowski.

Ĝi estas 240 paĝa, bela volumo kaj enhavas tre abundan kaj plenan kolekton de poemoj originalaj kaj majstre tradukitaj dum 25 jara literatura agado de s-o Grabowski.

el 30 lingvoj!

Ĝi estas vera antologio de tutmonda poezio.

La unikan libron devas posedi ĉiu amanto de belo, poezio, ĉiu organizanto de esp. koncertoj, ĉiu deklamanto aŭ kantisto kaj fine ĉiu esp. grup.

La prezo de la libro estas

1.00 Sm; kun sendelspezoj — 15.1 Sm; luksa eldono sur plej bela papero kun portreto de la aŭtoro — 2.00 Sm. kun trasendo — 2.25 Sm.

La libro estas senpage aldonata al ĉiu abonanto de «Pola Esp.», kies jarabono kostas 2.65 Sm.

Rapidu do aboni «P. Esp.» aŭ mendi la libron aparte. — La mendojn oni sendu al *Red. de Pola Esp. Varsovio str. Sopena N. 8.*

Oni povas ankaŭ mendi pere de «*Brazila Esperantisto*».

## LA MOVADO

*Monata Universala Gazeto (Propagando, Informo, Komercio, k. t. p).*

L' Esperantiste Français

Bulletin officiel de la Société Française pour la propagation de l'Espéranto.

Redakcio. — Administracio: 61, Bd. St. — Marcel. Paris.

Jarabono. fr. 3,25 (Sm 1,300)



Curso Elementar de Esperanto  
em 28 lições por

M. Mendes e C. Fernandes

PREÇO 1\$500

A' venda nas principaes livrarias e na Sede do Brazila Klubo «Espéranto», á Avenida Rio Branco n. 153. 2.º andar. Rio de Janeiro.

Internacia Esperantista Semajno-Kongreso. Gent, 14-20 Augusto 1913

## ELDONAĴOJ DE LA KONGRESO


1. *Reklamglumarkoj* spĉcaj; prezo frs. — Sm. 0.400 por 100 ekzempleroj en unu koverto.

2. Serion da 11 belegaj kolorigitaj poŝtkartoj, kua idajoj de la Ekspozicio. (nura oficiala eldono). *esperantan tekston*, prezo frs. 0.50. — Sm. 0.200. poŝtelspezoj plie.

Oni bonvolu ilia mendi, kaj aldoni al la mendo, ĉu poŝtmandare, ĉu en respondukopouoj, skribante al

S-ro Arthur Vermandel

Borgerhoutsche straat, 72  
ANTWERPEN Belgujo



## Scienca Gazeto

Internacia monata revuo pri Scienco kaj Industrio. Oficiala organo de la *Internacia Scienca Asocio Esperantista*.

Redakcio: Ch. Verax, 55, boulevard Arago, Paris (XIII) Administracio Hachette & Comp. 79 boulevard Saint-Germain, Paris. Jarabono 7,50 fr. — 3 sm.



## O Brasil Philatelico

Revista literaria, mensal, ilustrada dos colleccionadores de sellos, cartões postaes e dos esperantistas, com circulaçao em todo o mundo.

Unica, no genero, no Brasil. — 4.º anno. — Assignatura annual, com direito a premios, 3\$000.

Cada numero traz, além de varios artigos sobre o Esperanto, sellos e cartões postaes, grande numero de annuncios de colleccionadores de todo o mundo.

Sem demora, peçam um numero specimen, que, com prazer, sera' enviado pelo seu director-proprietario,

Dr. Benjamin C. Camozato,  
EM Cachoeira (RIO GRANDE DO SUL)

**CHAVES DE ESPERANTO**


CENTO 4\$000

AVENIDA RIO BRANCO, 153 — 2.º ANDAR

**TARIFO POR ANONCOJ**

1 Paĝo Sm. 15.....	20\$000
-1/2 » » 8	12\$000
1/4 » » 5.....	7\$500
1/8 » » 3..	4\$000

Por 2 foja anoncado rabato da 15 %  
 Por 3 » » 20 %  
 Por 6 » » 30 %



**OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA**

Organo de la Lingva Komitato kaj de la  
 Konstanta Komitato de la Kongresoj  
 Jara abono 5 fr.  
 Aperas ĉiumonate, krom en Septembro.  
 Ĉiuj esperantistoj devas ĝin aboni.  
 Redakcio kaj administracio:  
 51, rue de Clichy,—Paris.



Ĉiujmonata internacia gazeto

**Orienta Azio**

estas la sola, bela gazeto kun kolorigitaj ilus-  
 traĵoj, en Japanujo, Hindujo kaj Koreujo, kaj ĉiu  
 monate aldonas unu de «memlernantojn de  
 Japana aŭ Hina lingvoj, aŭ diversaj katalogoj.  
 Jarabono: 1.20 sm; duonjare 0.60 sm; provnu-  
 mero 0.10 sm. (Ni ne ricevas poŝtmarkojn,  
 krom Japana) Sin turni al la REDAKCIO «Se-  
 kaigo ŝoin» Osakimaĉi, Ebaragun, Tokio.  
 Japanujo



**ITALA LINGVO**

**Per Esperanto**

Itala Lingvo estas tiel simila al Esperanto  
 ke ĉiu Esperantisto povas per nur unu leciono  
 ĝin legi, per dudek lecionoj ĝin kompreni.  
 Sekve revueto. «L'Esperanto» iniciatas in-  
 struon de lingvo itala per ĉiulandaj Esperan-  
 tistoj, ĝin prezentante sub esperanta alfabeto.  
 Lecionoj aperas regulare la 10.an kaj la  
 25.an de ĉiu monato.

Abonu sendante 1 Sm. al Eldonisto

**A. PAOLET — S. Vito al Tagliamento**  
 (Udine-Italujo)

**Vortaro Esperanta Portugalala**

KOMPILITA DE TOBIAS R. LEITE

Um volume in 16, 176 paĝa.. 1\$500  
 Aĉetebla ĉe  
*Francisco Alves & C.*  
 166, rua do Ouvidor.—Rio de Janeiro.



**LINGVO INTERNACIA**

Monata Centro Organo de la Esperantistoj  
 nur en Esperanto (48 p. 13 X 20)  
 Jara abono 5 fr. (2-Sm)  
 Administracio: Presa Esperantista Societo.  
 33, rue Lacépède, Paris.



**LA REVUO**

Internacia literatura Gazeto. Kun la kon-  
 stanta kunlaborado de Dro. Zamenhof.  
 Jara abono 7 fr.  
 Redakcio kaj Administracio Librejo Ha-  
 chette & C., 79, Boul. S. Germain. Paris.



**DR. JOSE ARTHUR BOITEUX**

ADVOKATO

**Strato Hospicio, 24**  
 RIO DE JANEIRO



**LIVROS**

Na sêde do Brazila Klubo, á Avenida Rio  
 Branco n. 153, 2º andar, encontram-se á venda  
 os seguintes livros:

- Brazilio*. Parolado de Sro. E. Bäck-  
 heuser..... 1\$000
  - Methodo theorico e pratico do esperanto*  
 por Honorio Rivereto ..... 1\$000
  - Lina*, comedia, por Pedro A. Cou-  
 tinho ..... 1\$000
  - Esperanto*. Conferencia do Dr. An-  
 tonio C. de Arruda Beltrão..... \$500
  - Karlo*, facila legolibro, de Privat.. \$500
  - Parizina*, poema de Byron, esperan-  
 tigita de Dr. Venancio da Silva ..... 1\$000
  - Chaves de Esperanto*..... \$050
  - Curso Elementar de Esperanto*, por  
 M. Mendes e C. Fernandes..... 1\$500
- Ha tambem cartoespostaos de propaganda, pelo preço  
 de 50 rs. cada um, ou 600 rs. e 800 a duzia.



**Livros em Esperanto**

Aham-se á venda na Livraria Jacintho Silva, á rua  
 Rodrigo Silva n. 7, na Papularia Ideal, á rua Sete de Se-  
 tembro, 168 e na Livraria Gomes Pereira, r. Ouvidor, 91.  
 Diversos livros em Esperanto.

